

# le monde de L'ESPERANTO

# 572

15 décembre 2009

La Pologne, en particulier avec le Congrès Mondial d'Espéranto à Bialystok, était à l'honneur cette année. Cet événement majeur a donné une nouvelle impulsion au mouvement sur le plan local et national et de nombreuses initiatives s'inscrivent dans la durée et peuvent être d'ores et déjà considérées comme des valeurs sûres.



## L'espéranto en Pologne

L'espéranto de retour à l'Université

espéranto  
France

3,80 €

## éditorial • frontartikolo

**N**ouvel exercice, nouveau bureau, nouveau numéro. Beaucoup de nouveautés en cette année. Avant tout, je tiens à féliciter la rédactrice en chef et le metteur en page de cette revue et à remercier chaleureusement mon prédécesseur pour le travail effectué dans des conditions difficiles. À mon tour de me brûler les ailes.



C'est un honneur mais surtout une grande responsabilité pour moi. Les priorités que je nous fixe pour 2009-2010 sont le renforcement des liens avec nos membres, la coopération avec les autres associations d'espéranto, le soutien aux initiatives méritant d'être encouragées.

Citons ainsi MIREGE, Edukado.net, Solidarité Afrique etc. Vos projets, propositions, idées sont les bienvenus. Merci de nous en faire part.

Plusieurs exemples de coopérations inter-associatives sont à mentionner, avec Espéranto-Jeunes, qui signe 4 pages de ce numéro, avec l'association allemande d'espéranto, pour le congrès commun à Kaiserslautern, en mai 2010 et avec SAT-Amikaro et les autres associations françaises d'espéranto, pour la nouvelle rencontre commune en 2011, après le succès historique de Boulogne 2005.

Poursuivons résolument, contre vents et marées, malgré la crise et la grippe, notre action pour l'espéranto !

Je souhaite vous assurer, chers membres abonnés, de mon entière disponibilité et de mon engagement. Vous pouvez me contacter pour toute remarque, critique, suggestion, sur le fonctionnement et l'action d'Espéranto-France par courriel [prezidanto@esperanto-france.org](mailto:prezidanto@esperanto-france.org) ou par courrier au siège.

Aleks Kadar, président d'Espéranto-France

**N**ova agadjaro, nova estraro, nova numero. Multaj novaĵoj ĉi-jare. Antaŭ ĉio, mi deziras gratuli al la ĉefredaktoro kaj la enpaĝiganto de la revuo kaj varme danki al mia antaŭulo, pro la laborego farita malgraŭ malfacilaj kondiĉoj. Mia vico bruligi miajn flugilojn de malfacila vento. Estas honoro sed ĉefe granda respondeco por mi. Prioritatoj por 2009-2010 estas la plifortigo de la ligoj kun niaj membroj, la kunlaboro kun la aliaj Esperanto-asocioj kaj la subteno al apogindaj iniciatoj.

Ni citu ekzemple MIREGE, Edukado.net, Solidareco Afriko ktp. Viaj projektoj, proponoj, ideoj estas bonvenaj. Bonvolu sciigi ilin al ni.

Pluraj ekzemploj de inter-asociaj kunlaboroj estas menciindaj, kun JEFO, kiu kontribuis per 4 paĝoj al tiu-ĉi numero, kun la Germana Esperanto-Asocio, por la komuna kongreso en Kaiserslautern, majo 2010 kaj kun SAT-Amikaro kaj la aliaj francaj Esperanto-asocioj, por denova komuna renkontiĝo en 2011, post la historia sukceso de Bulonjo 2005.

Ni daŭrigu, malgraŭ ĉiuj malfacilaj ventoj, malgraŭ la krizo kaj la gripo, nian agadon por Esperanto ! Mi certigas al vi, karaj membro-abonantoj, ke mi estos tute disponebla kaj engaĝita. Vi povas kontakti min por ĉiu rimarko, kritiko, sugesto pri la funkciado kaj agado de UFE, retpoŝte al [prezidanto@esperanto-france.org](mailto:prezidanto@esperanto-france.org) aŭ poŝte al la sidejo.

Aleks Kadar, prezidanto de U.F.E.

## ACTUALITES

▸ Assises du développement durable à Caen p.4

## DOSSIER

▸ L'espéranto en Pologne p.6

## FOCUS

▸ L'espéranto de retour à l'Université ! p.10

## ASOCIA VIVO

▸ Alvoko por Grésillon p.12

▸ La koruso Interkant' en Bouresse p.13

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (Tél. 09 51 77 18 33 - Fax 01 42 78 08 47 - [www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org))

Tout (sauf réd.) : [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

Bimestriel : 6 n° par an - Dépôt légal à parution

**Tous droits de reproduction réservés**

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : X. Dewidehem

**Rédacteur en chef** : Claude Nourmont  
[mondo@esperanto-france.org](mailto:mondo@esperanto-france.org)

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro : M. Arnaud, F. Bartsch, A. Baudry, B. Behra, E. Bosquet, C. Chazarein, M.-H. Désert, X. Dewidehem, X. Godivier, J. Hédoux, S. Hug, C. Hurstel, A. Kadar, Y. Kerdiles, F. Levêque, F. Lo Jacomo, G. Martin, F. Martorell, B. Moon, G. Nénuphar, H. Ntahonsigaye, A.E. Ravache, L. Vignaud, P. Wierzbowski. Merci à eux !

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (6 n°) : 30€ à :

Espéranto-France, CCP : 855.35 D Paris

Impression : IPPAC, Langres (52),

membre de Imprim'vert

Imprimé en décembre 2009

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 1628-1942 - Commission paritaire : en cours



## L'espéranto à la Fête de l'Humana

**F**ête de l'Humanité, La Courneuve, près de Paris, du 11 au 13 septembre. Record d'affluence avec plus de 600 000 visiteurs. Au milieu des nombreuses tentes se trouvait le stand d'espéranto. Malgré quelques problèmes techniques, le stand a pu être ouvert dès le début de la fête. Un échantillonnage de livres et de CD était disponible pour attirer l'œil du visiteur mais également la crêpière installée sur le bout de l'étalage a attiré les gourmands. Les calendriers 2010, fraîchement imprimés, ont été distribués à 10 000 exemplaires malgré la difficulté de se frayer un passage entre les nombreux visiteurs pour la distribution. L'organisation du stand commence à être rodée avec différents tours de garde, ce qui a permis à tous de pouvoir profiter

du reste de la fête. Il est nécessaire d'avoir au moins une quinzaine de personnes prêtes à se relayer. Ce stand est organisé par la Fédération Espérantiste du Travail avec l'aide de trois autres associations, SAT-Amikaro, Espéranto-France et Espéranto-Jeunes.

Nous avons, cette année, rencontré de nombreuses personnes et expliqué sans relâche ce qu'était l'espéranto, quel en était l'intérêt, comment l'apprendre, etc. Les discussions avec les visiteurs sont allées bon train avec des questions qui étaient souvent les mêmes, mais parfois originales. Et cette petite fille qui me répond "l'espéranto, c'est difficile parce que, s'il n'y a pas d'exceptions, on va croire qu'il y en a !"...

Julia Hédoux

### en bref • mallonge

● **LE GROUPE D'ANGERS A PARTICIPÉ À NOUVEAU À LA JOURNÉE MONDIALE DE LA PAIX**

Il existe même une affiche en espéranto !



## Espéranto-France présente aux Assises nationales de l'éducation à l'environnement

**L**es assises nationales de l'éducation à l'environnement vers un développement durable (EEDD) ont eu lieu à Caen les 26, 27 et 28 octobre derniers par un temps magnifique pour la saison (et pour la région !). À l'heure des crises sociales, environnementales et financières enchevêtrées, à l'heure où l'on remet en cause nos modes de vie et de développement, les acteurs de l'éducation pour un développement durable rassemblent leurs forces et redoublent d'énergie pour faire entendre que, sans une éducation adéquate, il n'y aura pas de changement. C'est ainsi que plus de mille protagonistes venus des quatre coins de France ont, pendant trois jours, travaillé presque sans relâche, afin de porter la voix de la société civile dans la revendication d'une éducation aux valeurs de l'écologie et de la solidarité. Trois jours de débats, ateliers de production, conférences, forums et autant de moments infor-

mels et conviviaux dans un esprit aussi paisible et décontracté que volontaire et déterminé.

Et tout cela ne s'est pas produit sans qu'Espéranto France y apporte sa modeste contribution ! Eh oui, l'agenda 21 de l'association lui vaut d'être présente au sein d'un collectif d'acteurs de l'éducation populaire engagés dans l'EEDD, animé entre autres par le ministère de la jeunesse, des sports, de la santé et de la vie associative. Tout cela est finalement bien cohérent puisque nous sommes de plus en plus nombreux à penser que l'espéranto a un rôle important à tenir dans l'évolution de l'humanité vers la durabilité et la solidarité.

"Cela fait plaisir de voir que l'espéranto est représenté aux assises de l'EEDD !", voilà les termes par lesquels s'est adressée à nous Blandine, qui anime un réseau départemental d'EEDD, lorsque Bruno Flochon et moi tenions le stand d'Espéranto-France, au forum

organisé le deuxième soir des assises. Et elle ne fut pas la seule à nous faire bon accueil, soit parce que, comme elle, les acteurs de l'EEDD ont déjà réfléchi à la question\* et abouti à la conclusion que l'espéranto représente un excellent outil pour aller vite et mieux vers les objectifs du XXIème siècle, soit parce que, découvrant la chose sur place, l'évidence les frappait d'une grande cohésion de valeurs entre espéranto et développement durable.

C'est aussi cela, l'agenda 21 d'Espéranto-France : faire exister l'association, ses valeurs et ses actions dans un mouvement plus large. Avant l'avènement du développement durable, il était difficile d'inscrire l'espéranto dans une mouvance sans se politiser ni se "religioniser", c'est à dire sans se cloison-



Agenda 21



## Résolution du 94<sup>ème</sup> Congrès Mondial d'Espéranto

**L**e 94<sup>ème</sup> Congrès Mondial d'Espéranto, réuni à Białystok du 25 juillet au 1<sup>er</sup> août 2009, avec la participation de presque 2000 personnes de 63 pays, l'année du 150<sup>ème</sup> anniversaire de la naissance du créateur de l'Espéranto, Lazare Louis Zamenhof et en même temps l'Année Internationale de la Réconciliation proclamée par les Nations Unies, ayant discuté sur le thème du congrès "Créer un pont pacifique entre les peuples : Zamenhof aujourd'hui" et étudié avec une attention particulière la vie et les œuvres de Zamenhof, ayant noté le fait que la ville et la région de Białystok reconnaissent de plus en plus le rôle exceptionnellement important que Zamenhof a joué et continue à jouer comme figure mondialement reconnue dans l'évolution morale de l'humanité, conscient que cette recon-

naissance s'est concrétisée entre autres avec l'ouverture du Centre Zamenhof par les autorités municipales de Białystok et avec la proposition que l'Université de Białystok reçoive le nom de Zamenhof, rappelant qu'à l'occasion du 100<sup>ème</sup> anniversaire de la naissance de Lazare Louis Zamenhof l'Unesco l'a reconnu comme l'une des grandes personnalités mondiales et qu'au fil des ans sont venues nombre de reconnaissances similaires des mérites de Zamenhof comme grand penseur de dimension mondiale et félicitant les Nations Unies pour leurs initiatives relatives à l'idée de réconciliation, tellement essentielle dans un monde que divisent les désaccords dus aux préjugés et au manque de tolérance, constate que :

actes, aux efforts pour supprimer l'inimitié entre les membres des diverses religions, à l'éradication des préjugés raciaux et au refus de la guerre comme manière acceptable de résoudre les conflits –valeurs aussi importantes à l'époque actuelle qu'à l'époque de Zamenhof.



### vironnement, à Caen

ner. Mais le développement durable est un concept qui ne se donne pas d'autres cloisons que les limites géographiques de la planète et pas d'adhésion plus réduite que la démographie humaine entière. Le développement durable fédère les hommes et les femmes du monde entier autour d'une cause qui a su trouver des valeurs

universelles : sobriété, équité, solidarité, participation, transversalité, respect des équilibres naturels... il serait de bon ton que, dans cette utopie en marche, on entende de temps en temps crier "Jes ni povas !".

**Guillaume Nénuphar**

\* Rappelons que la lettre d'informations du réseau national École et Nature s'appelle KOLEKTI et mentionne bien qu'en espéranto, cela signifie "rassembler".

1. Avec la langue internationale espéranto, Zamenhof a créé un outil de communication internationale d'une efficacité unique, sur une base neutre, sans favoriser un peuple au détriment d'un autre et sans favoriser une langue ethnique au détriment d'une autre et que tout au long de plus de 120 ans d'usage l'espéranto a prouvé son adéquation en tant que langue internationale pleinement adaptable et adaptée à tous les besoins de communication.

2. Cependant, Zamenhof a dans le même temps compris qu'une langue est un bien collectif et a confié l'évolution de sa langue à la communauté de ses utilisateurs, de sorte que l'espéranto et sa culture sont devenus par essence une création collective, qui a évolué dans un esprit de démocratie linguistique.

3. Ce faisant, Zamenhof a également reconnu que l'utilisation d'une langue neutre dans les relations internationales aiderait à conserver les langues et cultures locales et régionales et l'identité de leurs communautés.

4. Zamenhof a aussi contribué de façon significative, par ses œuvres et ses

5. Par conséquent, Zamenhof mérite pleinement davantage d'attention non seulement en tant que créateur d'une langue, mais aussi en tant que personne qui a lutté pour une fraternité authentique entre les hommes sur la base d'une compréhension pleine et réciproque.

6. Une telle fraternité ne peut exister que lorsque les hommes se comprennent dans un respect mutuel – processus dans lequel l'espéranto peut jouer et joue déjà un rôle unique.

7. La compréhension est un pas essentiel vers cette réconciliation profonde et durable qui est l'idéal visé par l'Année Internationale de la Réconciliation.

8. La réconciliation n'est possible que dans une situation où les différences linguistiques ne font pas barrage à un dialogue égalitaire.

9. En ce sens l'espéranto est, de façon unique, adéquat comme base pour une réconciliation durable et l'Association Universelle d'Espéranto, par l'attention qu'elle porte aussi aux valeurs morales et au respect des droits de l'homme, peut jouer un rôle significatif dans la réalisation des objectifs de l'Année Internationale de la Réconciliation.

La Pologne, en particulier avec le Congrès Mondial d'Espéranto à Białystok, était à l'honneur cette année. Cet événement majeur a donné une nouvelle impulsion au mouvement sur le plan local et national et de nombreuses initiatives s'inscrivent dans la durée et peuvent être d'ores et déjà considérées comme des valeurs sûres.



## L'ESPÉRANTO EN POLOGNE

### Aktuale pri Esperanto en Pollando

Ĉirkaŭ la UK, okazis tre sukcesaj aranĝoj : Internacia Infana Kongreseto en Suprasl, pluraj antaŭkongresoj kaj postkongresoj, i.a. en Varsovio, en Malbork, en sandecia regiono, konferenco de ILEI en Krakovo, kongreso de LIBE en Muszyna, Ekumena Esperanto-Kongreso en Vroclavo... Sed Pollando havas longan tradicion de institucioj kiuj uzas Esperanton. Necesus aparta artikolo pri ĉiu el ili, mankas la spaco, do ni nur listigos la ĉefajn. Plej konata estas verŝajne Pola Radio, kiu jam dum 50 jaroj elsendas,

#### En préparation, les prochains dossiers

LME 573 : Ivo Lapenna

LME 574 : Esperanto en Sudameriko

Envoyez vos contributions à  
mondo@esperanto-france.org

nun aŭskulteblas ĉe [www.polskieradio.pl/co](http://www.polskieradio.pl/co). Sed ĉu vi konas TV ESPERANTO ? Temas pri bela iniciato de TV Białystok, vi trovos la elsendojn ĉe <http://tvbialystok.pl/tvesperanto>. Se ni parolas pri filmoj, ni ne forgesu la elstaran laboron de la reĝisoro Roman Dobrzynski, pri kiu ĉi jare ni havis filmfestivalon dum la UK, kun la kulmino per la prezento de Sinjoro Tadeo, esperanta versio de la filmo de Andrzej Wajda. Jam pli ol dek jaroj estas Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, en Bydgoszcz funkcias la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, en rilato kun AIS. Certe vi aŭdis pri la vojaĝagentejo Esperantotur en la sama urbo, sed ĉu vi scias, ke Malbork havas rekordan nombron da Zamenhof-Esperanto-Objektoj ? Kaj ni ne forgesu pri tradiciiĝintaj renkontiĝoj : ekzemple ARKONES (Artaj Konfrontoj) en Poznano estas nun je sia 25a eldono.

Claude Nourmont



Zamenhof  
en la tempo  
kiam li  
pripensis la  
internacian  
lingvon.  
Foto videbla  
en la Centro.





## La kleriga lundo

**L**a kleriga lundo estas ĉiam unu el la plej popularaj programeroj. La sesio 2009 estis aparte riĉa kaj varia, kun 15 seminarioj, certe tre instruaj por ĉiuj kaj la plej granda problemo : kion elekti inter paralele interesaj programeroj ?

Multaj el ni dev(int)us unuavice partopreni la seminarion de Dalia Pileckiene, el Litovio : Kiel mas-trumi sian tempon (kiu ne plendas : “Mi ne havas tempon“ ?).

Analizo de iuj fundamentaj aspektoj de la Esperanto-movado estis la temo de pluraj programeroj. Francois Simonnet proponis relegi la Deklaracion pri la Esenco de la Esperantismo, akceptita en Bulonjo-ĉe-Mar de la unua Kongreso de Esperanto en 1905, dum Mark Fettes proponis pripensi la vojon kiun la Manifesto de Prago, aperinta en 1996, montras por Esperanto en la 21<sup>a</sup> jarcento.

Kiel la movado kontribuas en diskutoj pri lingvaj rajtoj, kian teorion kaj praktikan rolon Esperanto povas ludi pri lingvaj rajtoj kaj lingvaj rajtoj pri Esperanto ? Tion demandis Kimura Goro, el Japanio. Alia



kunveno ankaŭ traktis la rilatojn de la Esperanto-movado al aliaj instancoj : UEA ĉe UN – UN ĉe UEA. La historio de la rilatoj kun UN kaj Unesco reiras preskaŭ al la komenco de UN. Intertempe la mondo ŝanĝiĝis kaj ŝanĝiĝis ankaŭ UN. Kiun rolon UEA nun ludu ĉe UN kaj Unesco ? Humphrey Tonkin, kun aliaj aktivuloj sur tiu tereno, gvidis diskuton pri la estonteco de la reciprokaj rilatoj. La ŝanĝiĝanta mondo estis temo por Francois Bartsch kaj Cyrille Hurstel, kiuj prezentis la triopan krizon : en la medio, en la energia kampo kaj en la financ-ekonomio (pri tio vi povis ankaŭ aŭdi dum la kongreso en Troyes).

Ĉu vi scias, ke oni povas distriĝi per matematiko ? Tion spertis la partoprenantoj de la seminario de Hannes Larsson, kiu traktis amuzajn aspektojn de matematikoj, senmisticigis ekzemple la misteran oran nombron kaj partoprenigis la ĉeestantaron per praktikaj problemoj.

Kaj Kimie Markarian kun Tahira Masako, el Japanio instruis la sorobanecan mensan kalkuladon, bona akriĝilo por la cerbo.

Ana Montesinos proponis tre partoprenigan seminarion : ni lernu ludante, kun la celo pligrandigi nian scion pri Esperantujo.

Denove Istvan Ertl kaj Brian Moon, ambaŭ profesiaj tradukistoj ĉe EU, proponis al la kongresanoj testi sian tradukkapablon : se Esperanto estus oficiala lingvo de EU, necesus do traduki al ĝi tekstojn pri ĉiaj fakkampoj kie EU rolas. Praktika (kaj ne facila) laboro, sekvita de terminologiaj kaj lingvopolitikaj konkludoj

kaj diskutoj. Cyrille Hurstel montris kiel organizi eventon kun interpretado, malkovrigante la labormetodojn de interpretistoj. La kunordiganto de prelegvojaĝoj por Esperanto-France,

Yves Nicolas, prezentis sian sperton, kun interveno de prelegintoj kaj akceptintaj kluboj.

Pri interkulturaj rilatoj temis du seminarioj : unu lingvo, malsamaj kulturoj. Esperantistoj havas komunan lingvon sed ne komunan referenckadron por bone kaj klare komuniki. Kristin Tytgat precizigis la normojn kaj valorojn de socioj kaj oni komune serĉis vojon por sukcese komuniki lingve kaj nelingve. En dialoga forumo laŭ metodo de D. Bohm, Elisabeth Schwarzer proponis aktivan kontribuon por interkompreniĝi malgraŭ miskomprenoj inter okcidentanoj kaj orientanoj.



Kaj ni finu per eble la plej granda defio al la kongresanoj, kiun proponis Anna Löwenstein : se vi organizus la unuan kongreson... Imagu, se Esperanto estus nova lingvo: ke la unua libro aperis en 1987, ne en 1887 kaj ke la plejmulto da novaj interesatoj lernas per Interreto. Se vi mem estus membro de la organiza komitato, kiel vi aranĝus tiun novstilan kongreson por juna asocio ? Malfacile eliri el la kutimaj ŝablonoj...

CNM

Jam legebla estas la trilingva retpaĝo de la Centro Ludoviko Zamenhof (<http://centrumzamenhofa.pl>). En ĝi troviĝas ĉefe informoj pri la agado de la Centro, ekspozicioj en ĝi kaj projektoj. Cetere, en la paĝaro <http://tvbialystok.pl/tvesperanto> vi povas spekti la plej novan elsendon de Bjalistoka Esperanto-Televideo. En ĝi spektblas raporto pri novaj projektoj de E@I, la spektaklo “Ludoviko-Lazaro” kaj rakonto pri la somera ekskurso de esperantistoj al Kroatujo.

(Przemyslaw Wierzbowski,  
Bjalistoka Esperanto-Societo :  
<http://espero.bialystok.pl>)

# Intervjuo de nova UK-partoprenanto

**Le Monde de l'Espéranto** : Saluton, Salomé, unue, ĉu vi povus mallonge prezenti vin ?

**Salomé Hug** : Mi nomiĝas Salomé Hug, mi estas 18-jaraĝa. Mi studas kognajn sciencojn en Nancio. Tiuj sciencoj kunligas neŭrosciencojn, psikologion, lingvistikon, filozofion, antropologion kaj komputikon cele al kompreno pri homa scikapableco.



**LME** : Kiam, kie vi eklernis Esperanton ?

**SH** : La lingvon internacian mi eklernis en 2005, unue per kursoj en Interreto kiaj tiuj kiujn proponas Ikurso kaj pli poste en la loka klubo de Metz kie okazis kursoj por progresantoj kaj aliaj interesaj kulturaj programeroj.

**LME** : La unuan fojon vi partoprenis Universalan Kongreson. Ĉu vi venis sola, aŭ kun konatuloj ?

**SH** : Al Bjalistoko mi venis kun post-IJKa karavano foririnta ekde Liberec', en Ĉeĥujo. La vojaĝo, kvankam longa, estis dank'al tio tre agrabla, akompanite de esperantistaj geamikoj en junulara kaj bonhumora etoso.

**LME** : Ĝenerale, ĉu vi ĝuis la kongreson ?

**SH** : Jes, la Universala Kongreso estas io spertinda almenaŭ unu fojon en sia vivo se oni deziras bone konatiĝi kun la esperanto-movado. Oni lernas multon pri ĝi dum tia grava jara evento, ĉu pri funkciado de UEA aŭ aliaj fakaj organizoj, ĉu pri esperantistoj ĝenerale kaj ties kutimoj kiuj ne aperas ĉe Interreto nek ĉe lokaj ne-internaciaj renkontiĝoj. Ĝi ankaŭ estas inda pro ĝia escepta

internacieco kaj diverseco.

**LME** : Kion vi plej ŝatis en la kongreso ?

**SH** : La solenan inaŭguron. Ĝi signas la malfermon de la kongreso en grandioza etoso. Eble tiu programero plej impresis min ĉar mi maltrafis tiun de la IJK, sed ĉiukaze ĝi jam estis por mi kvazaŭ simbolo de la UK pro ĝia iom pompa aspekto kaj ĝia miriga homamaso.

**LME** : Kion vi plej malŝatis ?

**SH** : Merkredon, la ekskluzive turisman tagon. Tia devigita eksterkongresatago ne estas tiom interesa, precipe ĉar ĝi ne estas la celo de vojaĝo al UK, sed ankaŭ ĉar unu tago tute ne sufiĉas por malkovri regionon kaj ĉiujn ĝiajn vizitindajn lokojn.

**LME** : Kio plej surprizis vin ?

**SH** : Tio, ke malgraŭ la ampleksa homamaso multaj homoj jam konas sin. Certe tio donas al la kongreso iun specifan karakteron, propra al esperanto-movado.

**LME** : Ĉu vi partoprenis specife porjunulajn programerojn ?

**SH** : Porjunulaj programeroj ne estas tiom multnombraj en UK, sed vespere en amasloĝejo ĉiam okazis ĉu danco kun muziko, ĉu komunaj ludoj kaj babiladoj, kio iom rememorigis la etoson de IJK en tamen relative pli granda proksimeco.

**LME** : Ĉu vi partoprenis programerojn de la kleriga lundo ? Kiujn ? Viaj impresoj ?

**SH** : Mi partoprenis prelegojn pri maniero organizi eventon kun interpretado kaj pri distraj matematikoj. Ili estas bonkvalitaj prelegoj, eble la plej interesaj kaj agrablaj el la tuta kongreso.

**LME** : Ĉu vi ĉeestis teatraĵojn ? Kiujn ? Viaj impresoj ?

**SH** : Jes, mi ĉeestis la teatraĵon

“Domo sur la landlimo“, moderna kaj amuza teatraĵo. La polaj aktoroj mirinde bone ludis kaj estis plezuro aŭdi ilin paroli tiel kompreneblan kaj natursonan Esperanton. Neniel videblis ke ili ne komprenis la tekston. Vere bone impresis la rezulto de ilia pena laboro, des pli ke tiajn bonkvalitajn spektaklojn oni malofte povas ĝui en Esperanto !

**LME** : Kaj pri muzikaj eroj ?

**SH** : Nu, ĉi-jare la granda tendo ne ofertis bonegajn sonorajn kondiĉojn por vere ĝui la muzikajn programerojn. Pri muzikaj eroj ŝajne pli bonas IJK !

**LME** : Ĉu vi ĉeestis fakajn kunsidojn ? Kiujn ?

**SH** : Mi ĉeestis kunsidojn de nefumantoj, ateistoj, kristanoj kaj kat-amantoj. Estas verdire sufiĉe amuze kaj interese ekscii pri agado de tiaj fakaj asocioj, kiujn oni povas ofte subtaksi sed kiuj ĉiuj atestas pri diverseco de nia movado kaj proponas veran agadon per utiligo de Esperanto.

**LME** : Kiujn konsilojn vi donus al viaj amikoj, kiuj ankoraŭ ne partoprenis UK kaj ŝatus partopreni ?

**SH** : Plej bone estus partopreni kun geamikoj kiuj jam spertis kongreson kaj tiel povas doni

konsilojn pri vidindaj aferoj, ĉar oni ja ne ĉion povas vidi en unu kongreso kaj la elektoj sufiĉe ampleksas. Laŭ mi ne indas kiel komencanto iri sola al tia kongreso, oni riskus perdiĝi en la amaso kaj rapide tediĝi.

**LME** : Ĉu vi ŝatus partopreni en la venontaj jaroj ?

**SH** : Jes, kial ne ? Certe multajn aliajn indajn aferojn mi ankoraŭ ne malkovris kaj ŝatus plu partopreni kongresojn por revidi geamikojn.

**LME** : Dankon !



# Bjalistoko el la vidpunkto de la eksteraj rilatoj

Bjalistoko unikas kiel trafloko, sed diversas sentoj de la ĉeestantoj. Kiel franco sentis ĝin per siaj naciaj okulvitoj? Jen sperto certe ne universala.

**A**ntaŭ tri jaroj, mi iam kalkulis la vastecon de Esperantio. Mia metodo estis sufiĉe

simpla. Je kioma distanco de la kongresejo dum la UK, eblas renkonti tute hazarde esperantiston en iu normala loko? En Florenco mi tiel kalkulis po 500 metroj.

Pri Bjalistoko, oni anoncis ion seriozan, eĉ grandiozan. Multe rememoris pri la 6000 ĉeestantoj en

Varsovio... Persone, mi kondukis la tutan familion al Pollando por ke miaj filinoj spertu lokon kie eblas uzi Esperanton tute normale, kvazaŭ finvenkiste!

Kelkajn monatojn post la reveno, venis tempo por bilanci kaj aldoni novan proverbon, neniel nova: "poloj parolas ĉefe la polan".

En la varsovia stacidomo, utilis paroli la rusan ĉe la internacia ĝiĉeto kaj nur la polan ĉe la nacia ĝiĉeto. Dezirante bileton por la unua de aŭgusto, mi ricevis ir-revenan bileton al la urbo Augustow, kiu tute hazarde proksimas al Bjalistoko per la sama fervojlinio.

En la loĝturoj de la kongresejo, denove utilis paroli la rusan, sed la angla provizis helpon al mi por trovi balailon. La kvara virino kiun oni alvokis scipovis la anglan, sed ne konis la vorton por nomi la celatan objekton.

Surstrate en Bjalistoko, oni ne troigu la utilon de la angla, sed tamen ĝi estas solvo por kutimaj aferoj. Trovinte la solan aŭtoluiston de la urbo kiu parolas la anglan, ni sukcesis kontrakti kaj ŝofori dum la tradicia ekskursita tago. Demandite pri la vojo

en iu fora kvartalo de Bjalistoko, renkontitaj junuloj bonkore helpis per sia trivorta vortprovizo, "jes", "rekte" kaj "deskre". "Maldekstren" ili ne konis. Ankaŭ taksioj neniam aŭdis pri la lingvo de Bill Gates. Tio eble ĝojigos nin, esperantistojn.

Veras ke kulpas ni, ni devintus pli bone paroli la lokan lingvon. Ni entuziasme montris la kelkajn lernintajn vortojn meze de nia kara Esperanto, sed tiaj streboj povas danĝeri. "ĝinkuje, ne danke oni diras, ni ne estas germanoj" oni akre respondis al mi. "Dankon" ne estas tuj identigebla kiel la surloke inventita lingvo.

Do, finfine, ĝis kiu grado la fina venko okazis en Bjalistoko?

Mi devas konfesi ke mia espero tro postulis. Fina venko ne okazis en la lulilo de nia lingvo. Nia lingvo ne fariĝis ilia dum la unua jarcento. Verŝajne ne ekzistas loko en la mondo, kiu konsideras Esperanton lingvo sia. Bone por nia universaleco. Konsiderante per racia metodo tiun kongreson, 1900 ĉeestantoj ne tiom multe imponas. Sed tiu komparo kun la 1987a kongreso estas ĝuste malracia. Pollando multe ŝanĝiĝis intertempe kaj ni devas lerni kiel konsideri la plenan parton de la glaso anstataŭ la malo.

Esperanto utilas kiel perilo kaj tre bone funkciis por ni por dungi infanvartistojn. Por ekstermovadaj aferoj, jen ĝia nuntempa valoro. Dank'al tiuj virinoj, niaj infanoj tre bone malkovris la urbon kaj la polan vivon, sed pere de la franca. Ĝuste tiel ni sciis ke la turistajn panelojn oni aldonis ĵus kelkajn monatojn antaŭ nia alveno.

La urbestro evidente multe subtenis la kongreson kaj tiu ĉi verŝajne multe firmigis la sanstaton de nia lingvo en ilia urbo. Sed ne nur la urbestro subtenis la kongreson. Ĉiuj konstatis la multnombrajn sponsorajn ŝildojn en la Zamenhofa salono, la tradukitajn dokumentojn por allogi turistojn, la imponan nombron da helpantoj. Amaskomunikilaj kontaktoj regulis kaj tre efikis. Ni eĉ rikoltis fruktojn de la laboro de France-Presse Pologne en niaj regionoj. Aperis kelkaj artikoloj en Francio kiuj rekte fontas el la laboro farita en Pollando. Polaj esperantistoj vekis intereson de ekstermovaduloj. Sukceso oni tion nomas. Mi simple esperas ke ni, foraj esperantistoj, ne seniluziigis ilin per nur 1900 ĉeestoj.

Pri kio estas kongreso, multis artaj eventoj, kiuj okazis en la urbo mem. Ni povis iri al teatro kaj koncerto kvazaŭ finvenkiste. La infanoj feliĉis kaj aprezis la koncertojn kaj iom post iom malkovras la esperantan kulturon. Per kongreso, esperanto-parolanto fariĝas esperantisto.

Kongreso estas malofta okazaĵo por renkonti homojn el kvazaŭ la tuta mondo. Dum renkontiĝoj naskiĝas nia kulturo. Kondiĉe ke vi havas ion direndan, vi povas esprimiĝi. Evidente, kelkaj aspektoj de niaj kongresoj ĝenas kelkajn ĉeestantojn, sed pro tio kulpas la kulturo kaj la movado mem. Mi bedaŭrinde ne povis ĉeesti la klerigan lundon kiam Anna Lowenstein zorgis pri la demando jena "Imagu, antaŭ 20 jaroj oni iniciatis la internacian lingvon kaj nun post longa interretumado, venis tempo organizi la unuan kongreson de Esperanto. Kiel vi imagas tiun eventon? Kion vi ŝatus?"

Cyrille Hurstel





# Une nouvelle « UE libre » à l'Université de Haute Alsace : l'espéranto



L'ouverture, en cette rentrée 2009 -10, de cette option d'espéranto (« UE libre » dans le jargon de l'université), correspond à la ferme volonté de la Faculté des Lettres, Langues et Sciences Humaines (FLSH) de l'Université de Haute Alsace (UHA), depuis de nombreuses années, de mettre en place sur le campus une véritable politique des langues. C'est pourquoi nous avons mis en place nous-mêmes, ou favorisé et accompagné, la création des options suivantes : français langue étrangère (FLE), espagnol, japonais, russe, arabe, yiddish, chinois, alsacien, langue des signes française et maintenant l'espéranto (sans compter nos langues diplômantes : l'allemand, l'anglais et l'italien).

La Langue Internationale espéranto ne pouvait plus être ignorée : reconnue par l'Unesco depuis 1954,

énormément utilisée dans les courriels, rendue visible par une wikipedia de plus de 100 000 articles, diffusée sur de nombreuses radios, sans compter son édition spéciale du « Monde Diplomatique », il fallait bien reconnaître que, pour un milieu universitaire, l'espéranto était devenu incontournable. N'est-il pas dès à présent la langue principale de l'Académie Internationale des Sciences de San-Marino <http://www.ais-sanmarino.org>, fondée en 1993, où enseignent des universitaires du monde entier ?

Et c'est parfois le devoir de l'Université de favoriser des mouvements de pensée qui sont porteurs de valeurs positives : c'est ainsi que dans les pas de Tolkien, Gandhi, Umberto Eco et Albert Jacquard, nous avons voulu



offrir à nos étudiants la possibilité de voir que la Bible, le Coran, Homère, Virgile, Omar Khayyam, Dante, Shakespeare, Molière, Voltaire, Goethe, Tolstoï, Ibsen, Freud, Tolkien, Camus, Sartre,

Grass et bien d'autres ont déjà été traduits en espéranto. N'oublions pas la littérature originale ! Quelle fabuleuse aventure humaine pour les esprits qui aiment dépasser les frontières !

L'espéranto permet, concrètement, dans le domaine de la littérature comparée par exemple, d'accéder relativement facilement à des textes d'origines diverses qui n'ont jamais été traduits en français : poésie croate, théâtre hongrois ou romans estoniens. L'étude des littératures étrangères dans une traduction en espéranto peut donner un excellent accès aux littératures

et aux cultures des petites nations, qui sont bien trop souvent négligées dans nos programmes. Alors, vu sous cet angle, l'espéranto est une ouverture privilégiée sur le monde et sur l'esprit des autres.

Au fond, l'espéranto, la Langue Internationale, est une langue « pont » indispensable à l'écologie des langues et une langue garante des patrimoines linguistiques mondiaux.

Par sa simplicité et par sa richesse – comme le disait Umberto Eco – elle représente potentiellement un fabuleux « retour sur investissement ». La graine a été plantée. Attendons avec impatience d'en voir la récolte.

Yann KERDILES

Doyen de la Faculté des Lettres, Langues et Sciences Humaines  
Université de Haute Alsace

## Esperanto-renkontiĝo

### Ne iru al Pluezek !

**S**e por via venonta Esperanto-evento vi bezonas hotelĉambrom tute proksima kaj ofte necesejon, se vi ne deziras partopreni al la purigado de la tabloj kaj manĝoĉambro aŭ eĉ de la teleroj post manĝo, se vi malŝatas senhonte malkrokodili, se vi ne amas maristajn kantojn kaj bretonajn dancojn, se vi ne deziras matenmanĝi estante servita de la prezidanto mem de Pluezek Esperanto, se vi nur konsentas pri serioza etoso, kie oni ne babilemas kaj ne ridas ĝis larmoj, se vi ne ŝatas etoson de granda familia renkontiĝo, ne iru al Pluezek.

Kiel paroli pri la senkomparebla etoso de Pluezek ? Temas pri io, kion oni spertas sed ne priparolas. Plej malfacile estas tuj post la foriro, oni sentiĝas kvazaŭ orfo perdinta sian tutan familion.

Post 2004 kaj 2006, mi denove parto-

prenis ĉi-somere al la famaj Pluezekaj Renkontiĝoj.

Iru aŭ ne iru, faru do kiel vi volas ! Mi ĉeestis en Pluezek kaj revenis hejmen pli feliĉa kaj pli riĉa. Esperanto-renkontiĝo estas mistera afero. Kun iom da strebo kaj bonvolo oni povas travivi interesajn spertojn kaj multe lerni.

Pri Pŝemo : mi volas skribi pri la kurso de Przemek Gzrybowski. Dum ses tagoj, ĉiu-matene, mi sekvis la kurson de tiu pola universitata instruisto (doktoro pri pedagogio), kiu por faciligi al ni la prononcon de lia nomo, proponis voki lin Pŝemo. Li tute ne ŝtelis sian titolon de doktoro pri pedagogio, ĉar mi malkovris grandan spertulon pri tiu fako. Ĉiutage li surprizis nin kiel li sci-povis laborigi nin pri kelkfoje temoj ĉi-tie ne rakontebaj. Tamen mi eble ne multe progresis en la lingvo mem, sed mi perdis iom de mia

timo paroli ĝin. La fakto, ke li estas volontulo en infanaj hospitaloj kiel "doktoro-klaŭno", decidigis min sekvi lian kurson.

Tiu homo povis nur esti bona homo. Jes ni ridis kaj travivis veran pedagogion per la rido, la amuzo kaj la ludo. Ni preskaŭ parolis senhezite sen tro krokodili. Ne parolu la polan, li diris al ni, kiam tamen ni perdis kelkajn francajn vortojn. Jen maniero (do pedagogio ?) instigi nin paroli Esperanton inter ni, tion mi malkovris. Li povas ankaŭ tute serioze prelegi pri tanatopedagogio (de Thanatos, la dio de la morto). Temas pri la maniero paroli, instrui pri la morto. Pri tiu pedagogio, li montris al ni kaj komentis, librojn por la infanoj. En tiuj libroj oni vidas ĉerkon, mortan beston, homon, etoson en hospitalo, ...ne por ŝoki, sed por montri simple la vivon, eĉ en sufero aŭ je la fino. ●●●

## Estraro de UFE

### Vorto de Xavier, kiel prezidinto

Karaj gemembroj,

Mi havis tiun honoron en majo 2008 esti elektita kiel prezidanto de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) kaj en majo 2009 esti reelektita tiupostene. La taskaro estas kompreneble tre ampleksa kaj postulas multan tempon.

En septembro 2008 post prijura studado mi estis dungita kiel loka ŝtato-ficisto, ĉefdirektoro de interurba grupo (Syndicat intercommunal Lys-Nord-Métropole) norde de la urbo Lille. Tiu ofico kun rimarkinda laboramaso kaj etendiĝemaj horaroj rabas tre multajn tempon kaj energion.

Nur en majo 2009 - samtempe kun nia landa kongreso en Troyes - revenis mia asistantino post sia

akuŝo. Tiumomente mi vere esperis poste havi pli multe da libera tempo kaj tiel pli bone zorgi pri miaj prezidantaj taskoj.

Konstatiĝis, ke de tiam mi povis fari pli multajn aferojn profesiajn sed bedaurinde mia laboramaso restis tre, tro tempo- kaj energi-raba. Tiel ke mia profesia ofico malebligis sufiĉan kaj decan laboron kiel prezidanto de UFE. Dume nia landa asocio bezonas projektojn, agojn kaj antaŭenigon. Respondeco mia postulis, ke mi ebligu al homoj fari tion, kion mi nuntempe ne plu kapablas fari.

Pro tio mi anoncas al vi kun sincera bedaurego, ke okaze de la landa komitatkunsido la 27<sup>an</sup> de septembro 2009 mi eksiĝis de la prezidanteco de la



danteco de la Unuiĝo Franca por Esperanto sendepende de miaj ceteraj

asociaj oficoj.

Nia landa komitato tiam elektis novan prezidanton, nome Aleks Kadar. Al li mi alportas miajn bondeziron kaj subtenon. Mi kompreneble plu aktivos en nia asocio kaj ĝiaj instancoj, ekzemple koncerne la regionajn federaciojn kaj la interasociajn rilatojn kaj kunlaborojn - mi ĝuste restas en la landa estraro por zorgi pri tiuj du kampoj.

Denove kun bedaurego, sed kun la espero tiel ebligi revigliĝon de la prezidanteco por la bono de nia asocio,

Xavier Dewidehem

## Maison Culturelle de l'Espéranto

# Le château de Grésillon doit renouveler son conseil d'administration

**L**a Maison Culturelle Espérantiste (MCE) est une coopérative dont les statuts de 1951 reposent sur la loi de 1917. En 2002, faute d'inscription au Registre du Commerce, elle a perdu sa personnalité juridique. La dernière Assemblée Générale (AG), qui s'est tenue le 16 mai 2009, a constaté qu'il reste un gros travail à faire pour actualiser sa structure, moderniser le château et faire venir davantage de stagiaires. Du fait de conflits internes ayant entraîné plusieurs démissions, l'Assemblée Générale a décidé de renouveler complètement, dans les six mois, le Conseil d'Administration (CA), afin de réaliser au mieux toutes les actions prévues. Il semble

en particulier utile d'élargir l'équipe chargée de la politique culturelle – programme, recrutement de stagiaires et encadrement des stages, information sur le château à l'intention des espérantistes, mais aussi des futurs espérantistes... – compte tenu qu'à l'époque actuelle, cette partie du travail peut se faire essentiellement par internet, contrairement à la rénovation du château lui-même qui nécessite des réunions sur place.

Une petite commission dirigée par François Lo Jacomo est chargée de réunir une liste de candidats afin de la présenter à l'Assemblée Générale Extraordinaire (AGE) qui devrait se tenir en décembre. La première réunion, le 28 septembre, avec notre

conseil juridique a permis de préciser que cette AGE devra décider des nouveaux statuts et élire un CA temporaire de 15 membres conforme aux anciens statuts qui sont toujours en vigueur. Ce Conseil d'Administration mettra en œuvre les décisions de l'AGE (enregistrement des nouveaux statuts...), organisera la saison 2010 de stages et préparera une deuxième AG conforme aux nouveaux statuts, avec éventuellement élection d'un nouveau CA.

Si vous vous intéressez à Grésillon et êtes prêt à investir de l'énergie pour faire vivre le château, même s'il ne vous est pas possible de participer régulièrement à des réunions sur place, merci de bien vouloir me

●●● Post tiom grava afero, li tute kapablas proponi al ni redakti artikolon pri la Grafino Pluzeka, kiu publike furzis (vi bone legis) dum oficiala tagmanĝo kun Zamenhof. Ni estis en du grupoj. La unua devas skribi artikolon por klaĉjurnalo, la alia por serioza gazeto por emeritoj. Ni evidente multe ridis kaj amuziĝis, eĉ forgesante, ke per tia maniero ni progresis en la praktikado de la lingvo.

Mi sekvis ankaŭ la vesperan prelegon de Pŝemo. Li montris filmon pri la doktoroj-klaŭnoj, kiuj vizitis Afganion kaj agis tie. Oni vidas en tiu filmo neeltenblan scenon de eta knabino bruligita sur granda parto de sia korpo, tenata de sia patrino dum la doktoroj kuracas ĝin kaj samtempe klaŭno dolĉe violonas kaj alia provas ridetigi ŝin. Kiel ili nur povis fari tion en tia situacio, antaŭ la sufer-krioj de la infano kaj la doloro kaj la larmoj de la patrino? La emocio estis grandega por kiu vidis tiun scenon. Feliĉe ĝi finiĝas montrante la infanon kaj ĝian patrinon iom kvietigitaj. Mi konkludis, ke klaŭnoj povus esti bonaj kuracistoj, almenaŭ bonegaj

kunagantoj, kiam oni celas doni iom da feliĉo al la malfeliĉuloj kaj iom da ĝojo aŭ, se tio ne eblas, almenaŭ iom da forgeso aŭ malaltigo de la sufero. Tiu simpla invito ridi, aŭ nur rideti, al homoj, kiuj havus tiom da kialoj por ne ridi, eĉ por nur plori, jen bela kaj kortuŝa donaco.

La intervenoj de Pŝemo kaj lia maniero instrui donis multajn nutraĵojn al miaj intelektaj pripensoj. La pedagogio per la rido estas serioza afero. Ĉu ne estas pli agrable lerni ridante ol suferante? Pli subtila, mi ankaŭ malkovris la pedagogion per la absurdo. La homo kiu per sia kapableco ridigi aliajn homojn pri absurdaj situacioj, povas doni al tiuj homoj pli kleran konscion pri tiuj suferigaj aŭ ne akcepteblaj situacioj. Kiam oni povas ridi pri ili, oni povas komenci ŝanĝi ilin aŭ almenaŭ la rigardon al ili. Tiu rido estas komenco por konsciigi kaj forto por kontraŭagi aŭ trovi la volon por plibonigi, pacigi, mildigi la situacion aŭ solvi la problemon. Ĉu nova maniero agi kaj vivi? Ĉu revolucia pedagogio? Venu al Pluzek. **Bernard Behra**

## La koruso Interkant

**L**e concert d'Interkant à Bouresse a été formidable! Un grand succès! Parmi le public, non seulement des espérantophones mais aussi beaucoup d'habitants du village, qui ont ainsi eu l'occasion non seulement d'assister à un spectacle exceptionnel, mais aussi de découvrir l'espéranto.

Tiel tekstis la invito :

Bouresse – la 12an de Julio 2009  
17h – preĝejo - "Kanto Ĝeneral"  
de Pablo Neruda/Mikis Theodorakis

48 gekantistoj/gemuzikistoj, omaĝos kaj prezentos 9 poemojn tradukitajn de Georges Lagrange dum kompleta spektaklo por deklamanto (J. Yvart), gesolistoj (Maja – FaMo), koruso "Interkant" orkestro sub la gvidado de Franjo Leveque.

Quelques impressions :

La Koruso Interkant', solistoj FaMo





contacter : francois@lojacomo.eu , en mentionnant un numéro de téléphone où je puisse vous joindre pour préciser la situation et la procédure. Il est également possible de me téléphoner au : 06 80 88 53 27. Ce premier contact permettra de mieux présenter les candidatures et d'envisager les tâches que chacun pourra accomplir au sein du Conseil d'Administration temporaire et par la suite, mais il n'est évidemment pas question de filtrer ni d'influencer : c'est l'Assemblée Générale Extraordinaire qui fera son choix.

François LO JACOMO

## ALVOKO al esperantaj asocioj

**L**a du kulturaj esperantaj centroj en Francio travivas grandajn malfacilaĵojn. De kelkaj jaroj, ili frontas almenaŭ unu similan problemon : malkresko de la partoprenantoj en la staĝoj.

Konsekvence, krom ĉiama almozpeditado, ili ne plu povas efike prizorgi siajn bienojn.

Venas tempo por ke ĉiu grava franca Esperanto-asocio sin demandas :

- Ĉu por Esperanto kaj por nia asocio, pluvido de tiuj centroj gravas ?

- Se jes, kiel nia asocio povos helpi la kulturajn centrojn ? (partopreni en administrado, organizi staĝojn aŭ renkontojn, kunredakti projekton pri estonteco...).

Tiun alvokon ni sendos al koncernaj asocioj, gazetoj por ke multaj esperantistoj ĝin transdonu, ĝin debatu kaj

asocioj respondu la demandojn.

Ni petas de ĉiuj esperantistoj, kiuj konsentas kun nia alvoko, ĝin subskribi.

la 5<sup>m</sup> de novembro 2009

Unuaj alvokantoj :

Denis Serge Clopeau

Xavier Godivier, komitatano de la kulturdomo de Grésillon

Jannick Huet, komitatano de la kulturdomo de Grésillon

Guy Martin, ekskomitatano de la kulturdomo de Grésillon.

Bert Schumann, konsilanto de la kulturdomo de Grésillon

Claude Trésorier, komitatano de la kulturdomo de Grésillon

## arkant' en Bouresse

kaj Maja (baritono kaj mezo-soprano), orkestreto kaj deklamanto Jacques Yvart kune sukcesis kantigi plenan preĝejon de Bouresse kaj emociigi la publikon.

La festkoncerto gaje finiĝis en Kvinpetalo, kiu akceptis la tutan koruson dum tiu ĉi neforgesebla semajnfino. De longtempe la kulturcentro de Kvinpetalo ne konis tiom da amika invado kaj movado.

Franjo

En effet, il semble que le concert fut bien perçu au regard de l'église remplie, des applaudissements nourris



et de la reprise du public avec les choristes, après une ovation à Franjo. Ce fut un moment fort en émotion et bon nombre de choristes, tout comme moi, ont versé quelques larmes. Nous sommes fiers d'avoir mené à terme le beau projet qu'a su nous faire partager Franjo ; je lui en suis extrêmement reconnaissante.

Geneviève

Karaj, fakte, estis kortuŝa momento, kiun havigis al ni Franjo pro sia projekto kaj sia forto. dankon al ŝi.

Mi ĝenerale bone staras longatempe, sed post sabata, dimanĉmatena, posttagmeza trejnado, mi vere suferis pro la gamboj. Sed, mi eĉ ne plu konsciis ke mi posedas gambojn dum la tuta koncerto. Eĉ poste !

Vere la aplaŭdoj estis tre sinceraj pro iliaj fruaj alvenoj. Ankaŭ niaj du solistoj ricevis fortegan aplaŭdon kaj poste la junaj muzikistoj.

Ni konservos bonan agrablan memoron pro ĉi.

Tereza



Sed ne nur tio okazis en Kvinpetalo.

Ankaŭ aliaj koncertoj okazis en la vilaĝo ĉi somere. Se vi volas scii pri la muzika staĝo, rigardu ĉe la paĝoj de Kvinpetalo :

- La fluto restis la plej uzata ilo por ludi diversajn muzikaĵojn : baroka, popola, romantika stilo. Ni eĉ kune kantis kaj ludis etan parton de la "Canto General". La junuloj adaptis amuzan parodion de nuntempa muzika komedio. Ili elektis ĝin en la repertuaro de la Kompanio "Jolie Môme" kaj ili prezentis ĝin dum la koncerto de la fino de la staĝo kun granda sukceso.

La spektantoj de Bures' multe aŭskultis, ridis kaj forte aplaŭdis. Poste ili gratulis la artistojn.

Espereble denove estos tiaj belaj momentoj en niaj kulturaj centroj !

Forpaso de aktiva esperantisto

# Adiaŭ, Michel Audibert !

**L**a 21an de Julio forpasis Michel Audibert. Ne forgesblas lia voĉo, kiam li deklamis “ La infero, tio estas la aliaj “ en Sen Eliro de Jean-Paul Sartre, burleskis “ Julia, vi ne troviĝas en via normala stato... “

en La Forpasinto de René de Obaldia kaj preskaŭ ĉi u vendrede, dum pli ol dudek jaroj, partoprenis en Pariza Radio Esperanto.

Naskita la 9<sup>am</sup> de oktobro 1930, li ekloĝis en Aubervilliers en

1946 kaj tie konatiĝis kun najbara junulo Jean Thierry. Li jam eksciis pri Esperanto, kiam Jean Thierry invitis lin ĉeesti la kabaredon de Raymond Schwartz, Tri koboldoj (ĝis 1956). Sen iu ajn instrumentado, li lernis la lingvon, komencis aktivi en la Pariza grupo kaj teatri kun Jean Thierry en la paroĥo de Aubervilliers.

Dum pli ol dek jaroj li rolis en franclingvaj kaj Esperantlingvaj teatraĵoj. Franclingve, li kvazaŭ magie aperis kaj malaperis sursceneje en “ Feu Monsieur de Marcy “ (fantoma Sinjoro de Marcy), de Max Régnier kaj Raymond Vincy. Esperantlingve en diversaj teatraĵoj de Jean Thierry (interalie kun Francine Ballaven, nomata “ la pantero “), sed ankaŭ en “ĉu vi konas la laktovojon ?“, kies aŭtoro, Karl Wiltlinger, spektis mem la prezentadon dum fervojista kongreso en Fulda (1967). Li edziĝis kun Kazue Sugawara dum Universala Kongreso en Kopenhago (1975). Ĉe fondiĝo de TESPA, Teatro Esperanto de Parizo (aŭtuno 1976), li estis vicprezidanto, interrompis teatradon dum kelkaj jaroj pro naskiĝo de lia filino Flavie, sed

poste revenis al TESPA kiel ĉefa aktoro.

Li daŭre trovis okazojn aktori en ambaŭ lingvoj. Franclingve, kun pseŭdonomo Flavius, li akceptis, dum trisemajna filmado, gravan rolon en hororiga filmo “ La Nuit

de la mort “ (La Nokto de la morto) de Raphaël Delpard (1980, en kiu Charlotte de Turkheim ludis sian unuan rolon) kaj ankoraŭ en 1988 partoprenis spektaklon de Guy Bertil “ Chôme qui peut “ (Senlaboru laŭeble), en kiu

aktoris senlaboruloj. Profesie li estis transitisto, sed ĉefe interesiĝis pri teatro, deklamado, partopreno en esperantaj aranĝoj...

Du sinsekvaj Universalaj Kongresoj, en 1982 kaj 1983, enprogramigis Seneliron de Jean-Paul Sartre, en kiu li ludis la ĉefan rolon, sursceneje de la komenco ĝis la fino de la spektaklo. Sed la plej multe prezentita teatraĵo el lia repertuaro estis, ekde 1984, La Forpasinto, burleskaĵo de René de Obaldia, laŭ reĝisoraj ideoj de Hector Malamud, argentina profesia komikisto, kun originala dekoro de André Cherpillod. Ankaŭ monologojn (La Advokato...), skeĉojn, kabaredaĵojn li disponis por respondi al ĉiu ebla invito. Dum la lastaj jaroj, li tre malfacile moviĝis, tamen daŭrigis kiel eble plej longe sian regulan partoprenon en la ĉiusemajnaj elsendoj de Radio Esperanto. Eĉ tie li aŭdigis kelkajn radioteatraĵojn, sed arde deziris proponi pli da deklamadoj : liaj kruroj lamiis ja, sed lia voĉo neniam laciĝis...

Ĝis li forlasis nin, pro pulma malsano. Adiaŭ, Flavius !

François Lo Jacomo



Januaro 2006

## en bref ● mallonge

### ● MIREGE ESTIS MIRINDA !



*MIREGE (Muzika Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Gejunuloj Eŭropaj) estis mirinda !*

*De la 24<sup>a</sup> ĝis la 31<sup>a</sup> de oktobro kunvenis en Baugé 24 adoleskuloj el 5 landoj, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Rumanio, Ukrainio, kun gvidantoj el la samaj landoj kaj krome venis homoj el Belgio, Italio kaj Luksemburgio. Tiu aranĝo okazis sub respondeco de UFE kaj ĝin subvenciis eŭropaj, lokaj kaj esperantaj instancoj.*



*Tuta dosiero pri la elstara renkontiĝo aperos en la venonta numero de LME. Kaj momente nur la konkludaj vortoj de Aurora, kiu gvidis la rumanan grupon : “mi devas konfesi ke, dum mia esperanta vivo, mi partoprenis multajn E-aranĝojn, sed neniu estis tiom bunta, instrua, plena je interesaj agaderoj ! Laŭ mi, malfacile oni povas organizi same riĉan E-eventon!”*





## Letero el Burundo

Kara leganto,  
Post akceptiĝo de ANEB (Asocio Nacia de Esperanto en Burundo) kiel landa asocio de UEA kaj de JEBUO (Junulara Esperantista Burunda Organizo) ĉe TEJO lastan jaron, ANEB duobligis sian agadon kaj vastigis sian laborkampon. Per la instrusekcio, ANEB sukcese organizis kursojn kaj ekzamenojn en diversaj regionoj de Burundo. La nombro de kluboj nekredible altiĝis, renkontiĝoj organizitaj de kluboj okazis, vizitoj fare de la estraro okazis kaj grava punkto estas la sukcese organizitaj seminarioj en ses regionoj en aŭgusto 2008 en tri provincoj (Makamba, Bujumbura kaj Bururi) kaj je kiu preskaŭ 100 personoj lernis espe-

ranton. La instruado de Johano kun sia edzino (el Nederlando) en januaro 2009 okazis. Rilatoj kun loka administracio kaj lernejestroj pliboniĝis kaj ankaŭ rilatoj kun eksterburundaj esperantistoj pliboniĝis. Ni ne forgesu leterojn senditajn al UNESKO-representanto en Bujumbura kaj al la Urbestro okaze de la dua nacia kongreso en julio 2009, la partopreno de esperantistoj al la internacia junulara festivalo en septembro 2009. Desegnante la preferatan arbon, multaj infanoj de Rumonge partoprenis la internacian konkurson pri desegnaĵo lanĉita de TAKE-Esperanto, daŭras la projekto de ĝemeliĝo inter Rumonge kun la urbo Tieling de Ĉinio, aĉeto de grundo kie ni jam plantis la unuajn fruktarbojn (oranĝarbojn kaj bananojn), akcepto de la Burunda

ILEI-sekcio (BIS), partopreno de la futbala teamo en la ĉijara turneo, kursoj kiuj okazis en diversaj universitatoj de Bujumburo inkluzive la ŝtatan. Al tio aldoniĝas la jam planita vizito de Portillo Alfred el Venezuelo en decembro en 2009. Se la E-agadoj de nia nacia asocio de Burundo (ANEB) plaĉas al vi kaj se vi deziras profundan kunlaboron por multon scii pri la evoluo de la movado, vi povas informiĝi aŭ kontakti la prezidanton (jerrybs21@yahoo.fr), aŭ la sekretarion de la asocio (ntahonsigayca@yahoo.fr), aŭ per la poŝto sendu leteron al : ANEB, BP 170 Rumonge, BURUNDI.

Kore,

Hasano NTAHONSIGAYE

## Kio okazas en la Ĉerizejo ?

### En direct du siège

**A**tous les membres d'Espéranto-France, l'équipe du siège souhaite une excellente fin d'année.

Crise ou pas, quand on appartient à une association dont le nom symbolise l'optimisme, on se doit d'être positif. Sachez que pour le siège, il n'y a pas eu de rentrée, en nous organisant et en nous relayant, nous avons pu maintenir le siège ouvert pendant l'été, le "4 bis rue de la Cerisaie" a fonctionné comme le reste de l'année.

Ainsi ont pu être accueillis divers visiteurs :

- des curieux venus s'informer (certains sont déjà revenus. Qui sait ? Peut-être de futurs adhérents) ;
- des espérantistes de différentes régions en visite dans la capitale ;
- des espérantistes étrangers : un Japonais, une Australienne d'origine russe, une Américaine d'origine iranienne, un Espagnol, trois Brésiliens...

Mais au fait, l'équipe du siège, qui sait vraiment ce que représente cette



Quelques bénévoles autour de Susanna et Xavier lors du pot de nouvel an 2009.

expression ? Il semble que pour beaucoup, ils s'agisse de mystérieux "ils" que l'on charge volontiers de toutes les responsabilités et de tous les péchés.

Alors voilà, autour de notre coordinatrice Susanna, on trouve le responsable du "libro-servo" Jean-Louis Pouillet et cinq ou six bénévoles, Jean-François, Hélène, Liliane, Anne-Marie, Méline, que vous pourrez rencontrer ou entendre en fonction de leur jour de présence, de vrais bénévoles qui donnent gratuitement de leur temps... Et en sont parfois de leur poche !

En trois mois d'été, cette modeste équipe a établi plus de 150 factures, dont beaucoup correspondent non à des achats sur place, mais à des envois en France ou à l'étranger (ainsi nous avons expédié trois commandes en Afrique, Burundi, Bénin, Côte d'Ivoire).

Préparer des commandes, établir des factures, faire les paquets, les timbrer, les porter à la poste, autant de tâches modestes mais indispensables.

Ajoutez à cela, toute la gestion administrative, les centaines de courriers reçus et envoyés par internet ainsi que par lettre, les demandes de renseignement par téléphone... et vous conviendrez que l'équipe n'a pas le temps de s'ennuyer.

Ainsi l'équipe du siège a-t-elle le sentiment d'avoir fait oeuvre utile.

Sachez aussi que vous serez toujours les bienvenus : la porte du siège vous est ouverte. Connaissant mieux l'équipe, vous comprendrez mieux ses problèmes et lui pardonnerez plus facilement quelques inévitables carences. Et qui sait, peut-être aurez-vous envie de participer un jour à ses efforts ?

C'est la première fois que nous nous adressons ainsi à vous.

Nous aimerions connaître vos réactions, vos suggestions, vos conseils. Ecrivez-nous : 4 bis rue de la Cerisaie - 75004 Paris

ou [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

D'avance à tous, merci !

L'équipe du siège



## Kio estas FESTO ?

**T**ion mi ne sciis antaŭ tiu ĉi somero. Mi rakontos al vi FESTO-n 2009, por ke ankaŭ vi sciu kio ĝi estas.

La unuan tagon, sabaton la 8-an de aŭgusto, ni renkontiĝis apud la stacidomo en Strasburgo por la karavano. Unue la tramo, poste tri aŭ kvar trajnoj, ni babilis kaj interkoniĝis. La aliaj esperantistoj klarigis al mi kio estas Esperantio kaj iomete kio estas FESTO.

Kiam ni alvenis en Zwingenberg, kvar viroj atendis nin. Ni marŝis ĝis la junulargastejo, kiu estas super la urbo. Dum la marŝado, la organizantoj afiŝis paperojn por gvidi la aliajn partoprenantojn.

Finfine, ni vidis la junulargastejon kaj renkontis kelkajn aliajn esperantistojn jam tie.

Post pagi la kasistinon kaj registriĝo, ni povis havi niajn ĉambrojn kaj FESTO povis komenciĝi !

Post afiŝi aliajn paperojn por ne perdi partoprenantojn, ni ĉiuj renkontiĝis ekstere por la interkona vespero. Ni lernis, ludinte, ĉiujn nomojn (pli malpli). Poste, ni aŭskultis la unuan koncerton, Stefo. La trinkejo kaj la ludoj ebligis al ni pli bone interkoniĝi.

Post longa tago, ni bezonis dormi, do la unua vespero ne daŭris tro longe.

Dimanĉon matene, ni havis matenmaĝon tro frue, kiel la aliajn tagojn. Sed kelkaj sukcesis vekigi. La karavano de Miro finfine alvenis, post kelkaj problemoj kaj nokto en la alia Zwingenberg. Post la matenmaĝo, Gijom preparis poetludon. Ni ne faris grandajn poeziaĵojn, sed ni multe ridis verkante tion.

Mi trovis mian unuan instruiston (mi eluzis

5 aŭ 6 dum la semajno, dankon al ili) kaj lernis kelkajn novajn vortojn.

Post la tagmanĝo, ĉiuj festuloj povis partopreni ludon en la urbo : ni devis trovi kaj foti, ĉion kio estis skribita en listo. La plej originala estis la plej bona.

La membroj de JEFO havis sian kunsidon, kie la novaj partoprenantoj lernis kiel funkcias la asocio kaj kiel ili povas helpi.

Vespere ni aŭskultis Gijom (kun la valsa versio de "Fek' al Esperanto"), poste vidis la fotojn, poste faris karaokeon.

Lunde matene, ni havis la unuan prelegon. Post tagmanĝo, ni havis ekskurson en la montaro. Sur la montaro, ni povis admiri la pejzaĝon.

Vespere, ni havis du koncertojn, Alles Franzizka kaj Supernova. Supernova ankaŭ havis sian propran version de "Fek' al Esperanto".

Marde matene, estis prelego. Post tagmanĝo, ni lernis danci kun Kapriol' por ilia koncerto merkrede vespere. Poste, ni iris al la naĝejo kie kelkaj esperantistoj lernigis al Germanio la tradicion de "la Bambo". Vespere, ni havis improvizan koncerton kun Tone kaj Kapriol'.

Merkrede matene, ĉiuj devis vekigi frue por iri en Frankfurton. Ni vizitis kaj promenis en la urbo la tutan tagon. Vespere, ni aŭskultis Kapriol'-on kaj dancis.

Ĵaŭde, post tagmanĝo, kelkaj iris al lago por marŝi kun bela granda suno. En la lago ni naĝis kaj ludis sed la pluvo komenciĝis kaj ne volis halti. Ni foriris trajne. Vespere ni havis du



koncertojn, La Pafklik kaj la unua versio de "Fek' al Esperanto", poste Tone.

Vendrede, ni havis prelegon kaj ni ekpakis. Vespere ni havis aperitivon kaj aŭskultis Inicialoj-n DC kaj poste, havis internacian vesperon kie ĉiuj kiuj volis

povis kanti aŭ muziki. Ni aŭskultis unufojan esperantan muzikgrupon kun du akordionoj, unu violono, du berimbaoj kaj unu diĝeriduo dum Tone kantis. Ni lernis kio estas teremino, elektronika muzikilo.

Post la vespero, ni ordigis kaj malafiŝis la paperojn.

Sabate matene ni helpis elirigi la muzikilaron antaŭ ol foriri, kun karavano ĝis Strasburgo, poste apartiĝi kaj rehejmeniri.



Ni vidis nin denove en JES.

Nun mi vidas ke klarigi kio estas FESTO ne estas facile. Skribante tion, mi ne povas montri al vi la ridojn, la babilojn, mi ne povas rakonti la muzikon, ĉiuj kiuj kantis estis tiel malsimilaj, mi ne povas diri kiu estis la plej bona, ĉiuj estis bonaj, malsimile. Mi tre ŝatis aŭskulti la saman kanton kun malsama stilo, estis mojosaj momentoj inter la kantistoj.

FESTO, por mi, estas miksaĵo de muziko, babilo, prelego, lerno, rido (multe), ludo, "sporto" (ne tro multe por mi, dankon). Eble plej gravas la amikoj kiujn mi havigis al mi tie.

Mi ne scias kie kaj kiam estos FESTO 2010, sed mi iros kaj vi ?

Anne-Emilie Ravache



## Mia unua IJK

**E**stis ĉi-somere la unua fojo en mia vivo, kiam dum pluraj monatoj mi havis nenion planitan. Nek studon, nek laboron, nenion. Mi faris kion mi volis entrepreni de longa tempo. Vojaĝis per Pasporta Servo, vivis en Ĉeĥio, partoprenis IJK-n. La tuta jaro estis malkovrado de miaj propraj ecoj, limoj, emoj. Kaj IJK estis la pinto.

La etoso en la karavano jam estis sufiĉe freneza, ni muzikis en la trajno, igis brazilaninon neesperantistan kunveni en Ĉeĥion dum ni traveturis Germanion... Kaj ni alvenis vespere je la 10a horo en tiu urbo kiu bele nomiĝas Liberec. Mi ne priskribos kio estas IJK, krom tio ke ĝi estas la plej ampleksa junulara renkontiĝo de Esperantio. Koncertoj, kino, prelegoj, kunludo, spektakloj, karaokeo, gufujo, trinkejo, diskejo, ekskursoj, 300 homoj el la tuta mondo.

Mi memzorgis. En la memzorgantejo mi dormis apud francino kaj litovinoj. Estis ankaŭ multe da karaj francoj. Sed tio ne gravas. Oni ne partoprenas IJK-n por dormi.

Okazas tiel, ke homo venas al iu renkontiĝo por plenumi certajn bezonojn. Preskaŭ ĉiuj bezonas proksimecon, amikumon, sed oni povas mencii ankaŭ bezonojn de komforto, de interfido, de harmonio, de egaleco, de ebrio, de arta plenumiĝo kaj la listo neniam finiĝas. Kion mi bezonis? Certe agnoskon kaj memfidon. Pro tio mi uzis, eluzis, elĉerpis ĉiujn eblecojn por montri min, por fariĝi populara, por esti admirata, por agnoskiĝi kaj dezirindi. Kaj jen la revelacio: en Esperantio tia agado funkcias.

Dum IJK mi partoprenis kvizon kun Rolf, apud Felix de Berlino, kun Michela el Italio kaj Tim la brito. Temis pri brita afero en kiu oni strebu serioze aspekti dum oni rakontas sultaĵojn. Pro miaj streboj kaj antaŭpreparo de la kvizo, mi sukcesis gajni. Tio estis eble unua fojo en mia



vivo, kiam mi havis tiom da atento, nur al mi. Mi tre ĝuis tion. Sammaniere, mi havis okazon elparoli salutojn franclingvajn per laŭtparolilo dum la lingva festivalo, ludis violonon dum la koncerto de Kim, spektaklis repe dum la internacia vespero kaj difektis ĉies oreltimpanojn per varbaj krioj "Festo festo!" kun karaj francoj.

Cetere, oni sciu ke IJK estas tre grava je fraŭla vidpunkto. Se oni venas kun malplena amvivo kaj kun deziro ŝanĝi tion, tiam oni certas ke oni reiros hejmen kun multe da travivaĵoj por memori, eble kun io en la koro (ĉu feliĉe aŭ bedaŭrinde) kaj certe kun tre ŝanĝitaj vidpunktoj kaj pli vastaj perspektivoj. Ĉi-tion mi spertis kiel eble plej. La scivolemuloj petos klaĉojn de homoj kiuj konas min.

Ĝuste pri klaĉoj mi konsciis ĉefe post IJK ke tie ĉi scias, kiu faras kion kaj kun kiu. Estas malpli facile (ankaŭ malpli necese) protekti sian intiman sferon en ĝi, do mi konsilas al ĉiu sufiĉe bone atenti pri tio, ĉar aliaj homoj sufiĉe rapide povas konstrui ian reputacion pri vi pro parta scio pri tio, kion vi faras.

En IJK mi do trovis ĉion, kio mankis al mi en la vera mondo: proksimumojn, agnoskon, konekton kun mi

mem, dezirindecon, intimajn spertojn, nuligon de multaj timoj. Mian tutan vivon mi pensos pri IJK kiel loko kie mi fariĝis plenkreska kaj multe pli ekvilibra homo. Forgesu pri la Esperanto-movado kaj zorgu pri vi mem. IJK reprezentas Esperanton tiudimensie, ke ĝi ŝanĝas ies vivon kaj neniam bedaŭrinde.

EN 2010 IJK okazas en Kubo, kie same okazos UK. Mi ne iros tien ĉar tro foras. Mi konsilas al homoj sperti ĉi-tion, kion mi priskribis, en FESTO 2010, kiu okazos aŭguste en Francio!

Emmanuel Bosquet

### Nova estraro de JEFO

espéranto  
Jeunes

Prezidanto : Emmanuel Bosquet  
Viceprezidanto : Maxime Valy  
Kasisto : Quentin Weber Seban  
Vickasistino : Julia Hédoux  
Sekretario : Baptiste Darthenay  
Respondeculo pri renkontiĝoj : Alexandre Raymond  
Ĉefredaktorino : Salomé Hug



## Vojaĝo tra tempo kaj spaco

**P**ost pli ol dek jaroj, Jacques Yvart revenas en Esperanto per poeziaj kantoj de diversaj aŭtoroj. Temas pri ŝatatoj kaj eĉ amatoj kun kiuj Jacques Yvart evidente flegas apartajn ligojn, interalie Leonard Cohen, Johnny Cash, Charles Baudelaire, Paul Fort, Jean-Baptiste Clément, Georges Moustaki. Por esperantigo tradukis aŭ adaptis la tekstojn Roel Havemann, Rikardo Cash, Marcel Redoulez, Ĵak Le Puil kaj Nanne Kalma, jen bela skipo ! Krome aldoniĝas propraj tekstoj kaj komponaĵoj.

De la unua kanto, ni kvazaŭ eniras hejmon de la artisto kaj ĉeestas intiman scenon : iom laca, raspa kaj profunda voĉo emocie retrovas ŝatatan poezion en nostalgia tono. Kio plej plaĉas al mi estas, ke kun melankolio konstante rivalas printempaj deziroj : restas vojaĝoj por komenci, novaj landoj

por malkovri, homoj por renkonti. La ritmoj foje baladas, latinas aŭ usonas, foje trankvilas, ĉiam respektas la originalan stilon. Kutime Sarah Alcalay violone akompanas la koncertojn. Ĉi foje, tuluza muzikistoj aldoniĝis, videble en perfekta akordiĝo : kuzaj kordinstrumentoj (gitaro kaj basgitaro, kontrabaso, citro, buzuko, mandolino) kunestas kun klavaroj, violono, akordiono kaj voĉoj laŭvice en la diversaj muzikpecoj. La drumo ofte diskretas : foje eĉ ne aŭdiĝas perkutiloj. Sekvas tre aparta etoso, kiam ekzemple nur gitaro donas la ritmon al fluanta melodio, aŭ kiam mandolino fandiĝas en la violono.



Inter malrapidaj blusoj aŭ maristaj kantoj, surprizis min la maniero trakti la poemon “la ĉevaleto” de Paul Fort, laŭ gaja usontradicia stilo.

Ĉiokaze plej gravas la tekstoj. Ili ĉiam atestas pri rigardo volonte malfermita al la mondo, de tiu granda vojaĝanto kiu plezure frandas esperantajn vortojn.

Kun la kutima kanzonlisto en tiu KD, aldoniĝas karaokedossiero kaj videosesio

kun intervjuo, laŭ nun bone mastrumita maniero de Vinilkosmo. Kaj do krom la konversacio kun Jacques Yvart ni ricevas ties afablan rideton plenan de ridfaltoj. Certe renkontenda homo, kies koncerton mi bedaŭrinde maltrafis pasintjare !

**Mari-elen'**  
*Invito por vojaĝo, de Jacques Yvart (Vinilkosmo, 2008). KD (kun karaokemuziko kaj videofilmeto), kun libreto entenanta la tekstojn.*

## Vinilkosmo ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi 2009

**O**kaze de la fermo de UK en Bjalistoko, la eldonejo Vinilkosmo ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi 2009, ankaŭ nomata “esperantista pacpremio”, ĉar ĝin oni donas pro agado, kiu antaŭenigas internacian amikecon kaj pacon.



Vinilkosmo kontribuas al tio per muzikaj rimedoj - tiel argumentis la estraro de UEA.

Estas agnosko al ĝia 21jara esperanto-muzika agado kiu strebas kontribui al paco kaj interkompreniĝo en la mondo per esperanto-muzika kulturo.

La premio konsistas el diplomo, kiun transprenis en Bjalistoko Jeanne-Marie Cash por transdoni al Floréal Martorell, la respondeculo de Vinilkosmo kaj EUROKKA en Donneville (apud Tuluzo). Krome, la premio konsistas el la sumo de 2000 eŭroj kiujn Vinilkosmo dediĉos por financi novan projekton de albumo de esperanto-artisto kaj enprogramadon de esperantista artisto kadre de turneo aux de kultura aranĝo aŭ de festivalo en la venontaj monatoj.

Cetere, ne forgesu viziti la novan freŝe kreitan MP3-Servon ĉe [www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com)

## Japana Esearo n°4

**L**aŭ iom simila maniero kiel Hori Jasuo ĉiujare, en tiu kolekto 14 japanaj esperantistoj verkas po unu eseon pri sia lando, siaj ideoj, sia ĉiutaga vivo. En 1994, 1995 kaj 2003 aperis la tri unuaj numeroj kaj en 2008 la kvara numero, por iel festi la 25jaran jubileon de la eldonejo “Libroteko Tokio”. Unua parto estas pli japaneca, dua parto pli esperantismas, sed ĉiokaze ili ĉiam iel temas pri la demando “kiel rilatas japana kulturo al tiu temo”. Krom tiu dispartigo, plej diversaj temoj estas traktitaj. Tio iras de “kiel katoj influis sur mia familia vivo” al “kiel solvi la dilemon de japana popolo koncerne militismon”. Aŭ de “kiel eliri el eŭropismo de Esperanto”, al “kiel laŭ historia vidpunkto evoluis Japanio”. La aŭtoroj iel reprezentas la japanan esperantistaron, sed klare redonas individuajn opiniojn pri interesoj foje personaj, foje kolektivaj.

La lingvaĵo devus inspiri eŭropajn verkontojn : preskaŭ neniam aperas neologismoj. Ne pro tio ke neologismoj estu forigendaj, sed ĉar tio bone reliefigas la plej efike uzeblan vortrezoron pri kiu eŭropanoj kaj azianoj povas interkonsenti por komuna kaj tuj komprenebla parolmaniero.

Tamen oni ne konsideru tion la nura avantaĝo de ĉi tiu libro, kiu interesos multajn, kiu ajn estu ilia lingvonivelo.

**Mari-elen'**  
*Japana Esearo n° 4 (diversaj aŭtoroj, Libroteko Tokio 2008)*